


# POLA ESPERANTISTO

Monata Organo de Polaj Esperantistaj Societoj.

## ESPERANTYSTA POLSKI

Organ Towarzystw Esperantystów Polskich.

Decembro, 1908.



Jaro I (III). № 12.

Redakcia Komitato:

Komitet Redakcyjny:

Redakt. D-r Leon Zamenhof

Dr. K. Bein (Kabe)  
Leo Belmont  
A. B. Brzostowski

Ks. Prof. A. Dąbrowski  
Antoni Grabowski  
A. Zakrzewski

Al la Komitato helpas per siaj konsiloj la Aŭtoro de Esperanto

D-r Ludwik Zamenhof.

### ENHAVO:

De la Redakcio.—Vox in dezerto. S. A. Dobrzański.—  
„Oni senfruktigis la animon, oni sekigis la cerbon“  
de Bielokoński, trad. A. Ossowski.—Internacia  
helpa monstemo.—Ekspozicio kaj pola kon-  
greso esperantista en Częstochova (1909).—Ĝo-  
jege ni naĝu! de A. Niemojewski, trad. Br. Kuhl.—  
„Se krevas kor“ de L. Belmont.—Kroniko.—  
Bibliografio.

### TREŢĈ:

Od Redakcji.—Vox in dezerto, S. A. Dobrzań-  
skiego.—„Wyjąłowili duszę, wysuszyli mózg“,  
Bielokońskiego, tłum. A. Ossowski.—Międzynarodowy  
pomocniczy system monetarny.—Wystawa  
i zjazd Esperantystów Polskich w Częstochowie  
(1909).—Żeglujmy wesoło! A. Niemojewskiego, tłum.  
Br. Kuhl.—„Se krevas kor“ L. Belmonta.—Kronika.—  
Bibliografja.

Adreso de la Redakcio:

WARSZAWA,  
(Varsovio)  
Marszałkowska 143.

Abonprezo—Prenumerata (1909)

Jare — rocznie: 2 rb. = 2.10 ₰  
kun aldono literatura }  
z dodatkiem literackim } 3 rb. = 3.15 ₰

Adreso de la Administr.:

WARSZAWA,  
(Varsovio)  
Hoża № 20, m. 12.

# F. Kozłowski OBECNIE S. NOWACKI

Warszawa, Rymarska 7, róg Leszna. — Telefon 39-99.

NAJTAŃSZE ŹRÓDŁO: Lamp, Porcelany, Fajansu, Szkła, Galanteryi, Noży, Widelcy etc., etc. Wynajmuje nakrycia stołowe, platerę, bieliznę, krzesła, stoły.

ZYRANDOLE kościelne i salonowe do świec i gazu. Wielki wybór. Najniższe ceny. Reperacje i odnawianie żyrandoli.

W wielkim wyborze przyzmy kryształowe do żyrandoli. Jedyny palnik naftowo-żarowy bez wszelkich komplikacji 60% oszczędności nafty. Komplet rub. 3.

## ZAKŁAD BRONZOWNICZY W. Komorowski i S<sup>ka</sup> WARSZAWA

Nowy-Świat № 12. — Telefon-№ 188-82.

Wykonywa do elektryczności: Żyrandole, lampy, pendle plafoniery i t. d. — Cenniki illustrowane na żądanie.

## Fabryka i Magazyn J. Kuczmierowski

Warszawa, Marszałkowska 108.

Poleca: Siodła, zaprzęgi, przybory podróżne, oraz galanterję skórzaną w wielkim wyborze.

Cenniki na żądanie.

## SKŁAD MEBLI

Majstrów Stolarskich

### Jana Berezińskiego

w Warszawie, ul. Królewska 6.  
wprost Mazowieckiej.

ROBOTY TAPICERSKIE

Dekoracje stylowe i fantazyjne.

Telefon 51-52.

**„MODERNE”** Wyborne MYDŁO  
**F. PULS.**  
TOW. AKC. w WARSZAWIE  
DOSTAĆ MOŻNA WE WSZYSTKICH LEPSZYCH PERFUMERJACH.

## „ŚWIAT”

TYGODNIK LITERACKI ILU-  
STROWANY POD REDAKCJĄ  
STEFANA KRZYWOSZEWSKIEGO.

Adres Redakcji i Administracji: Warszawa, Aleje Jerozolimskie 49.

Przedpłata „Świata“ wynosi: w Warszawie rocznie rb. 8, pół-  
rocznie rb. 4, kwartalnie rb. 2, na prowincji rocznie rb. 9, pół-  
rocznie rb. 4.50, kwartalnie rb. 2.25, zagranicą rocznie rb. 12,  
półrocznie rb. 6, kwartalnie rb. 3.

## MAGAZYN

Optyczno-Elektrotechniczny

### F. Czerwiński & C<sup>o</sup>

WARSZAWA

Krakow.-Przedmieście 37.

## Oficejo Instruista de K. Wasilewski

Strato Marszałkowska 123.

Rekomendas instruantojn,  
instruantinojn kaj guver-  
nantinojn diversajn.

## Skład Papieru R. KRUPECKI WARSZAWA,

Wierzbowa № 1.—Telefon 10-16.

POLECA: Materiały piśmienne i rysunkowe. Księgi  
buchalteryjne i t. p. Dostawa do biur i kantorów.

# „Esperantysta Polski“

MIESIĘCZNIK, POŚWIĘCONY SPRAWIE ROZPO-  
WSZECHNIANIA JĘZYKA MIĘDZYNARODOWEGO,  
w 1909 roku

BĘDZIE WYCHODZIĆ W ZESZYTACH OBJĘTOŚCI 16 STRON OBECNEGO  
FORMATU POD DOTYCHCZASOWĄ REDAKCJĄ, PRZY WSPÓLUDZIALE  
NAJWYBITNIEJSZYCH ESPERANTYSTÓW POLSKICH I ZAGRANICZNYCH.

## Nasz „Dodatek literacki“ do „E. P.“

powiększony wczwórnasób, (do 400 stron) będzie zawierał zbiór arcydzieł literatury  
polskiej i zagranicznej w przekładach pp.: K. Beina, L. Belmonta, A. Grabowskiego,  
A. Zakrzewskiego, Leona Zamenhofa i innych polskich i zagranicznych esperantystów.

Roczna prenumerata miesięcznika „Esper. Polski“ bez dodatku literackiego wynosić  
będzie Rb. 2, z dodatkiem — Rb. 3 wraz z przesyłką pocztową.

(Dodatek literacki w handlu księgarskim kosztować będzie 2 rb. 40 kop.; prenu-  
meratorzy „P. E.“ będą go otrzymywali za 1 rb. z przesyłką pocztową).

Dla nowo przybywających rocznych prenumeratorów w dalszym ciągu będzie  
dodawany bezpłatnie podręcznik języka Esperanto (Gramatyka i systematyczne cwi-  
czenia) wraz z 2 słownikami (esperancko-polskim i polsko-esperanckim).

Ci zaś roczni prenumeratorzy, dla których podręcznik będzie zbytecznym, mogą  
otrzymać wzamian, po cenie niższej, następujące książki:

- |   |           |
|---|-----------|
| 1) ROCZNIK „POLA ESPERANTISTO“ za rok 1908 za Rb. 1.—;<br>zbrozurowany za . . . . . Rb.                   | 1 20 kop. |
| 2) „PROTESILAS KAJ LAODAMIA“ St. Wyśpiańskiego w prze-<br>kładzie Leona Zamenhofa zamiast 50 kop. . . . . | — 35 kop. |
| 3) „JUĜO DE OZIRIS“ (Sienkiewicza, w przekładzie A. Gra-<br>bowskiego) zamiast 20 kop. . . . .            | — 15 kop. |
| 4) „EN FUMEJO DE L'OPPIO“ (Wł. Reymonta, w przekładzie<br>K. Beina) zamiast 20 kop. . . . .               | — 15 kop. |
| 5) „KIO OKAZIS FOJE EN SIDONO“ (Sienkiewicza, w przekła-<br>dzie A. Grabowskiego) zamiast 25 kop. . . . . | — 20 kop. |
| 6) „GRAMATYKA ESPERANTA“ z przykładami, A. Zakrzew-<br>skiego, zamiast 80 kop. . . . .                    | — 65 kop. |
| 7) „KURS HANDLOWY ESPERANTA“ (Marisiaux, w przekła-<br>dzie Zb. Kamińskiego) zamiast 60 kop. . . . .      | — 50 kop. |
| 8) „KONDUKANTO“ Ant. Grabowskiego, zamiast 90 kop. . . . .  | — 70 kop. |
| 9) FUNDAMENTA KRESTOMATIO“ d-ra Ludwika Zamenhofa,<br>zamiast 1 rb. 40 kop. . . . .                       | 1 10 kop. |
| 10) „VERDAJ FAJREROJ“ zbiorok poezji pana R. Frenkiela,<br>zamiast 40 kop. . . . .                        | — 30 kop. |

WRAZ Z PRZESYŁKĄ POCZTOWĄ.

PÓLROCZNI PRENUMERATORZY Z PREMIUM NIE KORZYSTAJĄ.

KWARTALNA PRENUMERATA NIE PRZYJMUJE SIĘ.

Mamy nadzieję, że przy poparciu pisma naszego przez wszystkich esperanty-  
stów polskich i zwolenników idei języka międzynarodowego, będziemy mogli je stale  
ulepszać i dążyć do postawienia go na wysokości zadania i utrzymania w pierw-  
szych szeregach pism esperanckich.



UPRASZAMY PRZYJACIOŁ NASZEGO PISMA O Wczesne odno-  
wienie prenumeraty i pozyskiwanie nowych abonentów.



Prenumeratę należy adresować wprost

Do Administracji „Pola Esperantisto“ Hoża 20 m. 12, w Warszawie.

# „Pola Esperantisto“

MONATA GAZETO EN ESPERANTA KAJ POLA LINGVOJ, ORGANO DE POLAJ ESPERANTISTOJ

en 1909 jaro

ELIROS EN KAJEROJ AMPLEKSE DE 16 PAĜOJ DE LA NUNA FORMATO SUB LA ĜISNUNA REDAKCIO KUN KUNLABORADO DE LA PLEJ EMINENTAJ ESPERANTISTOJ POLAJ KAJ EKSTERLANDAJ.

## Nia „Literatura aldono“ al „P. E.“

kvaroble pligrandigita (ĉirkaŭ 400 paĝoj), entenos kolekton da ĉefverkoj el la literaturo pola kaj eksterlanda en la traduko de s-roj: K. Bein, L. Belmont, A. Grabowski, A. Zakrzewski, Leono Zamenhof kaj aliaj polaj kaj eksterlandaj esperantistoj.

La jara abonpago de „Pola Esperantisto“ sen literatura aldono estos 2 rs. (2,10 Sm.) kun la aldono — 3 rs. (3,15 Sm.) kun la poŝta transsendo.

(La literatura aldono en librejoj kostos 2 rs. 40 kop. = ₰ 2,55. La abonantoj de „P. E.“ ricevos ĝin por 1 rs. = 1 ₰.

Por novaj jaraj abonantoj ni daŭrigos aldonadi senpage la lernolibron de Esperanto (Gramatyka i systematyczne ĉwiczenia, de D-ro L. L. Zamenhof) kune kun 2 vortaroj (esp.-pola kaj pola-esperanto).

Abonantoj, por kiuj la lernolibro estos superflua, povos ricevi anstataŭe laŭ malpli granda prezo la sekvantajn verkojn.

1) JARKOLEKTO DE „POLA ESPERANTISTO“ por la jaro 1908 po . . . . . ₰	1
broŝurita po . . . . .	1 20 sd.
2) „PROTESILAS KAJ LAODAMIA“ (de St. Wyspiański, trad. Leono Zamenhof) anstataŭ 50 sd. . . . .	— 35 sd.
3) „JUĜO DE OZIRIS“ (de Sienkiewicz, trad. A. Grabowski) anstataŭ 20 sd. . . . .	— 15 sd.
4) „EN FUMEJO DE L'OPIO“ (de Wł. Reymont, trad. K. Bein) anstataŭ 20 sd. . . . .	— 15 sd.
5) „KIO OKAZIS FOJE EN SIDONO“ (de Sienkiewicz, trad. A. Grabowski) anstataŭ 25 sd. . . . .	— 20 sd.
6) „GRAMATYKA ESPERANTA“ de A. Zakrzewski, anstataŭ 80 sd. . . . .	— 65 sd.
7) KURS HANDLOWY ESPERANTA (de Marisiaux, trad. Zb. Kamiński) anstataŭ 60 sd. . . . .	— 50 sd.
8) „KONDUKANTO“ de A. Grabowski, anstataŭ 90 sd. . . . .	— 70 sd.
9) „FUNDAMENTA KRESTOMATIO“ de D-ro L. L. Zamenhof, anstataŭ 1 ₰ 40 sd. . . . .	1 10 sd.
10) „VERDAJ FAJREJOJ“ kolekto da versaĵoj de R. Frenkiel, anstataŭ 40 sd. . . . .	— 30 sd.

KUNE KUN LA POŝTA TRANSENDO.

LA DUONJARAJ ABONANTOJ NE RICEVAS PREMIOJN.

LA KVARONJARAJ ABONPAGOJ NE ESTAS AKCEPTATAJ.

Ni esperas, ke ĉe la subteno de nia organo, de ĉiuj polaj esperantistoj kaj adeptoj de la lingvo internacia, ni povos ĝin konstante perfektigi kaj starigi sur la alteco de ĝia tasko — en la vico de la plej bonaj esperantaj ĵurnaloj.



NI PETAS LA AMIKOJN DE NIA GAZETO FRUE RENOVIGI LA ABONPAGON KAJ VARBI POR NI NOVAJN ABONANTOJN.




La abonon oni devas adresi senpere


Al la administracio de „Pola Esperantisto“, str. Hoża 20, en Warszawa (Varsovio).

# POLA ESPERANTISTO

Monata Organo de Polaj Esperantistaj Societoj



## ESPERANTYSTA POLSKI



Organ Towarzystw Esperantystów Polskich

Decembro, 1908.

WARSZAWA — VARSOVIO.

Jaro I (III). № 12.

Mija rok od czasu, kiedy *Warszawa* w spuściznie po *Lwowie* objęła wydawnictwo „Esperantysty Polskiego”.

Rok w dziejach każdego pisma, a tymbardziej pisma zupełnie nowego, które dopiero rozpoczyna torować sobie drogę w kierunku nowych haseł— jest okresem bardzo znamienym: stanowi on jakby próbę ogniową, w której przejawia się żywotność lub niezdolność do życia każdego nowego wydawnictwa. „Esperantysta Polski“ wyszedł z tej próby zwycięsko.

Kiedy przystępowaliśmy do wydawnictwa na początku roku, sądziliśmy, że pismo nasze na niepodatnym w naszym kraju gruncie będzie musiało zwalczać mnóstwo przeszkód. Dziś przyznajemy z radością, że obawy nasze były płonne. Zainteresowanie się esperantyzmem u nas okazało się dosyć poważnym—miesięcznik nasz znalazł wielu zwolenników.

„Esperantysta Polski“ zjawił się u nas we właściwym czasie. Powstał on, aby usystematyzować ruch esperancki i zbudzić zajęcie się tą sprawą w szerszych warstwach naszego społeczeństwa. W jednym i w drugim kierunku dokonał on swego zadania, i to dzisiaj, przed rozpoczęciem nowego roku, dodaje nam otuchy do dalszej pracy krzewienia w naszym kraju idei języka międzynarodowego.

Idąc za poradą wielu naszych czytelników, rozszerzamy w przyszłym roku program naszego wydawnictwa, ufni, że przyjaciele naszej idei nie tylko nie pozwolą upaść przed czasem młodemu naszemu organowi w Polsce, kołobce Esperanta, lecz przeciwnie — przyczynią się czynem i słowem do dalszego jego rozwoju,

Główną podstawą naszego pisma jest przeświadczenie o ostatecznym zwycięstwie idei jęz. międzynarodowego. Daje nam to możliwość łożenia na ołtarzu wspólnej idei ofiar materialnych i moralnych, w nadziei, że trudy nasze zostaną należycie ocenione przez wszystkich zwolenników naszej sprawy w Polsce.

Stojąc wytrwale na obranym stanowisku, zwracamy się z prośbą do naszych dotychczasowych czytelników, aby ułatwili możliwość naszemu organowi przeniknięcia do najszerzych warstw naszego społeczeństwa.

*Redakcja.*

## Vox in dezerto.

Znamy kosmopolitów—ludzi, których ojczyzny są tam, gdzie im dobrze, sybarytów ludzkości, egoistów odzianych w wielkie słowa, którzy przed pierwszym obowiązkiem obłudnie zasłaniają się obowiązkiem ostatnim. Znamy szowinistów, przed swoją budą, na łańcuchu, warczących na cały świat. Znamy też ludzkich wołów, których usta zawsze pracują dla ich żołądków; których zadaniem być pędzonemi, gdzie należy. Pośród nich wszystkich zagubiła się idea ludzkości.

A problemat istoty ludzkości wkraça na porządek dzienny życia i domaga się rozwiązania: oto już różne frazesy o narodowości i międzynarodowości stały się okrzykami wojny nieciekawej; ale za uczciwym stanowiskiem dopiero należy się rozejrzeć.

Spółczeństwo i ludzkość nie są bytami samoistnemi: społeczeństwo jest formą stosunków między jednostkami—ludzkość — między społeczeństwami, jako takimi, nie zaś między mniej lub więcej niepowołanemi ich przedstawicielami. Jeżeli doskonałe stosunki istnieć mogą tylko między ludźmi względnie doskonałemi, i to doskonałemi w stopniu względnie równomiernym, to, kto dąży do idealnego społeczeństwa musi też dążyć do udoskonalenia jednostki; ludzkość zaś idealna przedstawi mu się jako idealne ustosunkowanie doskonałych społeczeństw. Ponieważ zaś stan każdej jednostki, czy grupy bezpośrednio zależy od ich stosunków z innemi tegoż rzędu istotami, przeto, wbrew amatorom ogólnoludzkich frazesów oraz krótkowidztwa lokalno-praktycznego, czysty duch ludzki w niepowstrzymanej swojej ewolucji jednocześnie zawsze będzie dążył we wszystkich wspomnianych kierunkach.

Dzisiejsza ludzkość zamieniła się w zgraje gryzących się psów. Religja, język, literatura, kultura, sztuka, — przemyśl—wszystko, co powinnyby służyć za ozdobę życia, co powinno wzajemnie być

uszanowane i służyć podwaliną pokoju— to wszystko zamieniło się w ochryplę okrzyki szczucia ludzi przeciw ludziom, narodów przeciw narodom. Poniżenie ludów i człowieka już zbyt jest wielkie, wyzwalając się od opiekunów we wszystkich dziedzinach życia, ludzie i w zakresie międzyspołecznego obcowania wreszcie powiedzą: dość faktorów, pośredników, „uczciwych maklerów“ — zbyt dobre interesa czynią na cudzy rachunek.

Człowiek nie kończy się na czynnościach fizjologicznych i fachowych,—choć umie na nich poprzestać. Nie będziemy mówić o tych wirtuozach; szukamy człowieka, który jest poza nimi. Ponad granicami państw, mimo bismarkowską pięść zaciśniętą przeciw sprawiedliwości, poza wszelką dyplomacją i polityką i ponad tym wszystkim — my poszukujemy „czystej treści człowieka“, idąc w świat z oliwną gałązką pokoju. Ale omijamy ludzi byle jakich; nie marnujemy słów przed obliczem byle kogo. Rozumiemy to, że całe mnóstwo ludzi nie umie pojąć najbliższych swych obowiązków, oraz istoty najprostszych stosunków między ludźmi; nie możemy wymagać, ażeby się wznieśli do pojmovania ludzkości, do odczucia człowieczeństwa. Jesteśmy bezpieczni, że kto umie odczuć smak, barwę, zadowolenie, a wreszcie najprostsze wrażenia i zjawiska życia codziennego, a nie umie odczuwać zjawisk wyższego rzędu, — ten nie będzie miał celu z nami się połączyć węzłami wspólnej idei ludzkości. Widzimy, że nie mamy możliwości przerobić ten marny porządek świata, pełnego obrzydliwości: odwracamy się od niego. Pozostawiamy go własnemu losowi. Ale poza nim, niezależnie od niego, poza tą ludzkością, która powinna zginąć, my z siebie samych— stwarzamy oddzielną, inną, nową ludzkość: taką, jaka być powinna i jaka, na dłuższą metę, jest jedynie możliwa.

Uczucie jest czymś, co przesyca całą

dziedzinę życia ludzkiego, jak delikatny eter dziedziny wszechświata. Ono faluje w potokach historii, drży w czynach, pali się w myślach dobrych i złych; wieńczy momenty szczęścia. Znamy uczucia rodzinne, społeczne, patryjotyczne, a teraz jest też uczucie esperantyczne, które będzie nazwane: uczucie ludzkości. Jeżeli bowiem obcowanie rodzinne i społeczne było źródłem odpowiednich uczuć, to stosownie urządzone obcowanie międzynarodowe musi powołać do życia też nową ich sferę, która będzie takim zbogaceniem serca, jakim było przejście od szczupłych uczuć rodzinnych do szerokiej dziedziny uczuć społecznych.

W tym pojmowaniu istoty ludzkości, jej zadań, jej związku z problematami indywidualnego i społecznego bytu; w tym dążeniu pchnięcia na inne tory wzajemnych między ludami stosunków; w tym pragnieniu, aby poza sferą bezpłodnych, demoralizujących i niszczących walk, wytworzyć niezależną sferę iście człowieczego życia — w tym tkwi ideowa treść esperantyzmu. Ona nam daje wytrwanie i moc; ona nas czyni serdecznym kołem braci. Przez nią my się stajemy „przedmową do przyszłej zjednoczonej ludzkości“, kiedy się zrzeknie bratobójczych walk.

„Ze wszystkich krańców świata co rocznie zjeżdżamy się wzmacniać naszą wiarę w moralną siłę i przyszłość człowieczeństwa. Nie przybywamy na kongresy dla pracy; my pracujemy cały rok. Tu tylko obliczamy wyniki; przedewszystkim zaś zjeżdżamy się, aby świętować: świętować przyjaźń i braterstwo wszystkich ludów ziemi“.

Tak mówił Ludwik Zamenhof na tegorocznym kongresie esperanckim w Dreźnie. I rzeczywiście. Było nas do 2000 ludzi, mówiących 34 językami. Świetna sala Vereinshaus'u wypełniała się po brzegi, szumiała wesołym rozgwarem, grzmiała potężnymi tonami pieśni, wielki organ wstrząsał falami powietrza, rozszalałe grzmoty niezapomnianych oklasków uderzały o wysoki plafon, a tłum, radosny, uniesiony — o jednym sercu bijącym jak dzwon — składał hołd czynny idei braterstwa wszystkich ludów ziemi.

Co zjednoczyło nas? Język, przedziwny język, druga rodzima mowa każdego. Bo mowa obca — to mowa narodu obcego; język, którym mówiliśmy, był własnym językiem każdego z nas. On symbolem naszych dążeń, uczuć i jedności; on sztandarem naszych idei; walczyć za niego będziemy do końca.

*Stefan A. Dobrzański (Kielce).*

## BJELOKOŃSKI.

# Oni senfruktigis la animon, oni sekigis la cerb on.

### I.

Estis jaŭdo, kaj en la loĝejo de Nikolao Vasiliĉ Berezovski kunvenis liaj konatoj. Tiajn jaŭdajn kunvenojn Nikolao Berezovski aranĝadis jam de longa tempo, kaj nun li ne forlasas tiun „tradicion“, servantan al li kiel bona rememoro pri lia estinteco. Ĝia komenco atingas tiujn brilajn jarojn, kiam Berezovski ĵus finis universitatajn studojn, kaj forte inspirata de modernaj ideoj, decidis labori en la kampo literatura, al kio li sentis

grandan emon. Tiun ĉi lian penadon forte subtenis bela, simpatia, juna fraŭlino, Olga Vladimirovna, kiu baldaŭ fariĝis lia edzino. La sorto favoris Nikolaon Vasiliĉ: liaj unuaj beletristikaj verkoj estis proklamitaj kiel eksterordinare talentaj, kaj tio malfermis antaŭ li la pordojn de la plej bonaj redakcioj, kaj proksimigis lin al profesiaj literaturistoj. Ĉe tiuj ĉi lastaj, alterne, en difinitaj tagoj de semajno, okazis interesaj kunvenoj. Tio ĉi tre plaĉis al Berezovski, kaj li aranĝis ĉe si la „jaŭdojn“, kaj de tiu tempo en la daŭro

de dudek jaroj Nikolao Vasiliĉ kaj Olga Vladimirovna ĉiuĵaŭde estis hejme, kaj akceptis gastojn, kvankam jam de dek jaroj, estis ĉe ili neniu literaturisto, kaj la vesperkunvenoj ricevis tute alian karakteron pro la kaŭzo tuj klarigota.

## II.

Kvankam unuaj paŝoj de Nikolao Vasiliĉ en la literaturo estis sukcesaj, ĉar montriĝis lia talento kaj malfermiĝis antaŭ li redakciaj pordoj, tamen li trovis sin en malbona materiala situacio: pro la ekzistanta cenzuro liaj verkoj tute ne povis esti presataj. Post kiam tri gazetoj unu post alia ricevis registaran averton, kaj la elirado de unu el ili estis eĉ tute ĉesigita pro la enpresado de liaj rakontoj, Berezovski estis devigita verki nur por si mem kaj por siaj amikoj, kiuj volonte aŭskultis lin legantan liajn verkojn dum la ĵaŭdoj, kaj sincere admiris lian talenton. Sed, kompreneble, tio donis al li nenian materialan profiton, kiel ankaŭ ne donis al li profiton la verkoj presitaj eksterlande. Kaj jen naskiĝas infanoj, kaj fariĝas pli kaj pli malfacile vivi. Li provis jam alkutimiĝi al la ekzistantaj leĝoj kaj akordigi siajn verkojn kun la postuloj de la cenzuro, sed tio ĉi estis kontraŭa al lia naturo, kaj ankaŭ Olga Vladimirovna kategorie malaprobis tion: „pli bone estas tute ne skribi, ol skribi malnoble...“ diris ŝi, kiel ordinare sincere kaj simplanime.

## III.

Longan tempon Nikolao Vasiliĉ estis konsternita, pasigis multe da sendormaj noktoj, pripensante, kion entrepreni, kaj fine li trovis nenion pli bonan, ol serĉi oficon. Li trovis ĝin en akciza oficejo. Komence li estis konfuzita pro sia „servado en la drinkeja fako“, kiel li ironie nomis sian oficon; kaj li ne forlasis sian antaŭan vivmanieron, li ne ĉesis interesiĝi pri la literaturo, tamen iom post iom liaj oficaĵaj aferoj kaj novaj konatoj ĉiam pli kaj pli malproksimigis lin de la societo, kun kiu li antaŭe interrilatis, kaj liaj ĵaŭdaj kunvenoj iom post iom ŝanĝis sian fizionomion. Anstataŭ la legado kaj literatura diskutado, komenciĝis kartludoj kun oficistoj, drinkado, interparolado pri

oficejaj aferoj, pri salajro, monrekompenco kaj la estraro. Nikolao Vasiliĉ iom vaniĝis, kaj ofte drinkis. Olga Vladimirovna kaŝiite ploris dum la noktoj, sed nenion diris al la edzo por ne akriĝi lian internan vundon, ĉar ŝi mem kredis ke ŝi estas en tio iom kulpa. „Kion do mi diros al li, se li sola devas nutri min kaj la infanojn — kion mi konsilos al li?“ — ŝi demandis sin mem kaj ne povis trovi respondon.

## IV.

Unu ĵaŭdon, pri kiu estas nun parolate, en la loĝejo de Berezovski kunvenis kelkaj oficistoj kun siaj edzinoj kaj unu instruisto de gimnazio. Ili trinkis teon kaj parolis pri siaj oficejaj aferoj. Kiam la tetrinko finiĝis, Nikolao Vasiliĉ petis la servistinon malkovri ludtablon, pretigi kreton kaj ludkartojn, kaj ekbruligi la kandelojn sur la tablo. Post tio la kunvenintoj komencis ordinaran antaŭludan interdiskuton. Preskaŭ en la sama momento, kiam la gastoj estis irontaj al la ludtablo, en la antaŭĉambro aŭdiĝis sonorilo.

— Jen, ankoraŭ iu venis — diris Nikolao Vasiliĉ.

Sed montriĝis, ke sendito alportis leteron.

— De kiu ĝi povas esti?—demandis Nikolao Vasiliĉ.

— Vi ludu, kaj mi malfermos—diris Olga Vladimirovna, prenante la leteron.

— Nikolĉjo, karulo, aŭskultu!—subite ekkriis ĝoje Olga Vladimirovna.

— Kion do? Nu?

— Mi laŭte tralegos...

Kaj Olga Vladimirovna komencis legi: „Kara Nikolao Vasiliĉ! Mi rapidas sciigi vin pri la novaĵo, kiu treege ĝojigos vin: antaŭ momento estis ricevita telegramo pri la libereco de presado. En proksimaj tagoj mi rekomencas eldonadi mian gazeton, kies eliradon oni ĉesigis antaŭ dudek jaroj pro via artikolo. Kiam oni komunikis al mi tiun sciigon, mi tuj ekpensis pri vi. Do vi, mia kara, prenu plumon kaj skribu, kion vi volas, kaj kiel vi volas, mi petas, nur multe. Mi imagas, kiaj mirindaĵoj eliros el sub via plumo ĉe la libereco de l' presado. Profunde vin estimanta kaj sincere via P. Rosnev.“



P. S. Se vi bezonas monon, sciigu; kompreneble mi tuj sendos“.

Kiam Olga Vladimirovna finis legi, Nikolao Vasiliĉ leviĝis, rektiĝis, liaj okuloj ekbrilis, kaj lia vizaĝo fariĝis serena.

— Nu miaj amikoj,—li diris—pardonu min, vi ludu kartojn, kaj mi iros skribi; mi revenos al vi eble iom pli malfrue.

— Kompreneble, kompreneble, ni ludos sen vi—diris kontenteghe Olga Vladimirovna.

— Kiel? vi ankaŭ ludos?—li demandis ridetante al la edzino.

— Jes, mi ludos, sed nur por ke vi iru skribi.

— Vi iru, vi iru, — diris kelkaj voĉoj, — ni ludos sen vi.

Kaj Nikolao Vasiliĉ iris en sian kabineton.

Tuj post li enkuris Olga Vladimirovna.

## V.

Ŝi varmege kisis sian edzon, metis siajn manojn sur lian ŝultron, kaj rigardante liajn okulojn, diris:

— Mia kara, mi nur por momento eniris ĉi-tien por elverŝi ondiĝantajn en mi sentojn, ĉar alie mi plorus de ĝojo antaŭ la gastoj... Vi povas nun imagi al vi, en kiel alta animstato mi nun estas... Mi turmentiĝis ja, vidante, kemiakara Nikolĉjo, mia ĝojo, mia fiero devas esti nur akciza oficisto. Mi certigas vin, ke mi efektive ne vivis... Kaj jen la vivo rekomenciĝas... Ja ĝi estas reviviĝo! Vi komprenas, reviviĝo de mortintoj!

Ŝi alpremis sian kapon al la brusto de l' edzo, kaj larmoj torente elfluis el ŝiaj okuloj.

Nikolao Vasiliĉ karesis kaj kisis sian amikinon, kaj diris:

— Kaj eble vi pensas, ke mi bone fartis? Se la ĝisnuna stato daŭrus ankoraŭ kelke da tempo, mi ne scias, kio okazus kun mi... Sed, tamen, sufiĉe pri tio... Laboru la cerbo! mi rekomencas verkadon... Sed jen, bedaŭrinde, mia kara, mi havas nek paperon, nek plumojn, kaj ankaŭ la inko jam sekiĝis... Jen estas unu plumo, sed per ĝi oni povas skribi ne pli ol unu vorton...

— Mia kara, vi tuj havos ĉion: la butikoj ne estas ankoraŭ fermitaj, kaj la

servistino tuj alportos... Mi tuj ĉion pretigos...

Olga Vladimirovna foriris, kaj Nikolao Vasiliĉ promenis tra la ĉambro, pripensante la temon por sia unua verko ĉe la libereco de presado. En la pasinta tempo la temoj centope alflugis al lia cerbo, eĉ dum la dormo. Ofte okazis, ke kiam li vekiĝis noktmeze, li skizis planon por estonta verko... Kaj nun...

## VI.

La alportitaj plumoj, papero kaj inko jam longe kuŝis sur la tablo, kaj Nikolao Vasiliĉ ne povis komenci la skribadon. Li ĉiam paŝis, mallevente la kapon kaj penante retrovi la penson... Sed ĝi ne aperis. En lia kapo regis ia nepriskibebla ĥaoso. Jen kvazaŭ aperas io viva, kaptebla, sed tuj sin kaŝas, dronas en la maro de l'vaneco; al lia cerbo ree trudiĝas alkoholdestilejo, boteloj; estroj de la akciza oficejo, kartludoj kaj restoracioj... Kaj ĉio ĉi aparte, sen reciproka kunligo, kvazaŭ en stereoskopo. Li volis perforte turni sian atenton al sia propra vivo por pentri ĝin, por priskribi siajn animajn turmentojn, kiujn li suferis... Kaj li haltis ĉe tiu ĉi temo kaj komencis skribi; sed el sub la plumo eliĝis nur vortoj senanimaj, enuaj, kaj Nikolao Vasiliĉ kun abomeno disŝiris sian unuan provaĵon, kaj ree paŝis kaj pensis, pensis kaj paŝis... Fine li rememoris pri siaj antaŭaj verkoj... Granda idéo! Ili donos materialon por pripensado!... Berezovski ĵetis sin al la skribotablo, kaj komencis serĉi en la tirkestoj. Li traserĉis ĉion, sed trovis nenion. Tiam duonmalferminte la pordon, li alvokis la edzinon.

— Kion vi bezonas, karulo? — demandis ŝi, enirinte en la kabineton.—Dio! kiel pala vi estas, la manoj kiel malvarmaj, kaj ŝajnas al mi, estas larmoj en la okuloj... Cetere, mi komprenas vin...

— Olnjo, ĉu vi ne memoras, kie estas miaj rakontoj, skizoj? Ĉiuj ja kestoj estis plenigitaj de ili...

Ĉu vere vi forgesis, kie ili estas?

— Kie do?

— Vi rememoru, kiam oni fermis la gazeton, oni antaŭsciigis nin pri la revizio...

— Jes, jes, jes!... Mi memoras... Dio mia!... Do ĉio pereis?...

— Kaj pro via kulpo, mia kara... Mi diris, ke oni devas ĉion kaŝi, kaj unuan fojon, ne obeante vin, mi portis ĉion al Medvjedjev,—vi memoras? Ĝi estis antaŭ dek jaroj...

— Mi rememoras...

— Nu, kaj kiam Medvjedjev, atendente revizion, ĉion redonis al ni, kaj poste estis arestita, vi ĉion bruligis... Ĉu vi memoras?

— Jes, mi memoras,—mallaŭte diris Nikolao Vasiliĉ,—do, nenio restis?...

— Jes, mia kara...

— Nu, nenion pli; foriru...

Olga Vladimirovna riverencis, ekpreminte la manon de l' edzo kaj foriris dirante:

— Skribu, karulo, mi amuzos la gastojn; cetere, ili baldaŭ foriros...

## VII.

Post la foriro de l' edzino Nikolao Vasilido eksentis, ke singultoj kunpremas lian gorgon, kaj larmoj sin ĵetas al la okuloj. Li aliris al la tablo, apogis al ĝi sian kapon kaj laŭte ekploris, kiel infano, sin detenante, por ke oni ne aŭdu lian ploron en la gastoĉambro... Kun la verkoj de lia junaĝo estis kunligita tuta lia pasinta vivo, kaj li volis ilin kapti, kiel dronanto kaptas pajleron... Sed montriĝis, ke eĉ pajlero mankas, kaj Nikolaon Vasiliĉ forlasis la lastaj fortoj, cedante lokon al plena malespero... Kiam li iom rekonsciiĝis, li skribis la sekvantan leteron al la redaktoro:

„Kara Petro Valerjanoviĉ! Via espero pri mia kunlaborado estas tute senbaza... Kiam mi skribas tiujn ĉi liniojn, mi klare sentas, ke mi jam taŭgas por nenio: ĉiuj miaj kapabloj estas absolute neniigitaj... Malnobla sklava reĝimo! Kiom da homoj ĝi pereigis! Kiom da vivoj ĝi kripligis!... Oni diras, ke hundo, longan tempon alligita al ĉeno, ne eliras el sia budo post kiam oni fine liberigas ĝin... Same mia penso: katenigita en la daŭro de dudek jaroj, ĝi ne povas nun eliri ekster la budon... Unuvorte, kara Petro Valerjanoviĉ, vi forgesu pri mi; vi turnu vin al novaj homoj, kiuj ankoraŭ ne suferis sklavecon de

l' korpo kaj de l' animo, ĉar en mi oni senfruktigis la animon, oni sekigis la cerbon“.

Kiam Nikolao Vasiliĉ tralegis tiun ĉi leteron, teruro kaptis lin... „Dio! Ĉu efektive mi pereis?“... Li ree ekiris tra la ĉambro, kaj poste decidis eliri por enspiri freŝan aeron... Iam, antaŭ longa tempo, dum la promenado multaj—multaj pensoj aliradis al lia kapo...

Li eliris nevidite.

Estis jam deknua horo.

Mallumo de l' aŭtuna vespero ankoraŭ pli multe pezis la pezan jam animstaton de Nikolao Vasiliĉ, precipe, kiam li, trairinte lumigitajn stratojn, trovis sin en malluma parto de l' antaŭurbo. „Kiam ĉiuj sidis en koto—li pensis—al mi ankaŭ ŝajnis ebla sidi en ĝi, sed nun, en nova vivo, sidi sola en koto kaj rigardi, kiel tiu ĉi nova vivo, feliĉa kaj pura, preterpasas flanke de mi,—ĝi estas netolerebla“. Kvankam Nikolao Vasiliĉ estis forlasinta literaturon, tamen profunde en lia animo kaŝis sin espero, ke, kiam ekregos pli bonaj vivkondiĉoj, li revenos al ĝi... Sed nun tiun ĉi esperon li perdis... Samtempe senĉese lin persekutis la penso pri lia varmege amata edzino. „Malfeliĉa Olnjo! Ŝi eĉ ne imagis, ke ŝi pasigos tutan sian vivon kun pereinta homo... Kiel multe ŝi ĝojis, kaj kiel varmege kaj sincere ŝi eldiris ĉion, kion ŝi ĝis nun suferis... Kio okazos al ŝi, kiam ŝi ekscios, ke ĉio estas perdita?... Tiu ĉi penso terurigas Nikolaon Vasiliĉ'on. Li elstreĉis tutan sian organismon, ĉiujn siajn nervojn, por revivigi la talenton, sed ĉiuj pensoj estis vanaj... Ĝuste en la sama momento li ekvidis malproksime du malgrandajn lumojn, kaj li rimarkis, ke li staras apud la fervojaj reloj... Tiuj ĉi lumoj profunde enpensigis Nikolaon Vasiliĉ... Jen ili estas pli kaj pli proksime... Ĝi estis granda ŝarĝvagonaro, rapidanta al la stacidomo kaj direktata de dormemaj fervoj-oficistoj... Minuto de ŝanceliĝo... kaj Berezovski rapide suriras la digon kaj tuj antaŭ la preterkuranta vagonaro metas la kapon sur la relon... Kaj neniu rimarkis, ke homo pereis... La vagonaro kun bruego kuris for, detranĉinte la kapon de Nikolao Vasiliĉ de lia korpo, kiu ruliĝis en apudan foson...

## VIII.

La gastoj estis tuj forirontaj...

— Nikolĉjo!—vokis tra la pordo Olga Vladimirovna, —venu, adiaŭu la gastojn.

Respondo ne estis.

Ŝi malfermis la pordon.

— Nikolĉjo!... Li forestas...

Olga Vladimirovna eniris en la ĉambron, kaj reveninte de tie, demandis la servistinon:

— Kie estas Nikolao Vasiliĉ?

— Mi ne scias... Sed povas esti, ke li foriris ien; la ĉapo kaj la palto ankaŭ ne estas.

— Li foriris?... Jes, efektive...

Olga Vladimirovna ree eniris en la kabineton, alpaŝis al la tablo, kaj, traleginte la leteron, iĝis senmova: terura antaŭsento kaptis ŝin...

(el rusa lingvo) *Ant. Ossowski.*

## Internacia helpa monsystemo.

Multaj niaj legantoj demandis nin, kio estas internacia monsystemo, pri kiu nun ofte estas preparolate en esperantaj ĵurnaloj. Al tiuj, kiuj ankoraŭ ne havis okazon konatiĝi kun ĝi pli proksime, ni povas rekomendi tre detalan artikolon pri tiu ĉi temo en la maja № de „Internacia Scienca Revuo“<sup>\*</sup>), skribitan de la projektinto mem S-ro René de Saussure, aŭ la bonegan broŝurton pri tiu ĉi temo de S-ro P. Corret: „Internacia helpa monsystemo“ (10 cm.) Dume ni donos ĉi tie kelkajn ĝeneralajn klarigojn, kiuj konatigos la scivolajn almenaŭ kun ĝiaj ĉefaj punktoj.

Kiel ni scias, kelkaj mezursistemoj estas jam internaciigitaj. La internaciigo de la monsystemo apartenas al demandoj tre gravaj je la vidpunkto praktika, sed bedaŭrinde samtempe tre malfacilaj. La malfacileco de tiu ĉi internaciigo dependas antaŭ ĉio de nekonstantaj valoroj de diversnaciaj moneroj. La ĉiam balanciĝanta monvaloro malebligas konstrui ian difinitivan komparan tabelon por ĉiu landa monunujo. Se tamen oni lasos flanke tiun ĉi kondiĉon de kursdiferencoj kaj, se oni apogos la tabelon nur sur la ora valoro de moneroj, oni povas tre facile konstrui tabelon de internacia komuna monsystemo. Se ni agos tiamaniere kaj

ĉiam la precizigon de monvaloro ni reguligos aparte laŭ ekzistantaj kursoj, ni povos krei artefaritan teorion monunuon, kiu tute sufiĉos por praktikaj uzoj. Cetere oni jam konas la rilatajn valorojn de la diversaj naciaj monoj; ekzemple: 2,08 fr. = 1,652 ŝilingojn = 1,69 markojn = 0,407 dolarojn = 0,78 rublojn k. t. p. Sekve, se ni nur aldonos al tiu ĉi vico universalan (esperantan) monunuon per la vorto *speso*<sup>\*</sup>), la difino de tiu ĉi nova teknika esprimo estos jena:

(Esp.)  $x$  speso = (Fr.) 2,08 frankojn = (A) 1,652 ŝilingojn = (G) 1,69 markojn = (U. S. A.) 0,407 dolarojn = (R) 0,78 rb...

Se ni donos al  $x$  difinitan nombran valoron, la problemo estos facile solvita.

Por fiksi la valoron de  $x$ , S-ro René de Saussure proponas la sekvantan metodon. 1) Oni donu al la universala unuo „speso“ teorion monvaloron tre malgrandan, tiamaniere, ke oni povu esprimi iajn monsumon naciajn per speso, 2) akceptante „speson“ kiel plej malgrandan teorion unuon, oni uzu praktikan unuon milfoje pli grandvaloran, *spesmilo* (1000 speso), kiu por la esperantistoj servu tiel same, kiel por la Francoj franko, por la Angloj ŝilingo, por la Germanoj marko, por la Rusoj rublo k. t. p.

Tiamaniere ni havos la sekvantan

<sup>\*</sup>) *Svisujo* Genève 8 Rue Bovy-Lysberg.

<sup>\*</sup>) France: „*espèce*“, Angle: „*specie*“.

teorian tabelon: 1 Spesmilo ( $\mathfrak{S}$ ) = 1000 spesoj = 100 spesdekojn = (10 spescentojn).

Kiel praktikajn monunuojn S-ro R. de Saussure proponas spesmilon ( $\mathfrak{S}$ )—la plej grandan monunuon kaj spesdekon (Sd) la plej malgrandan monunuon.

Apogante sin sur tiu ĉi simpla kalkulo kaj aplikinte sian sistemon al la konstanta ora valoro de diversnaciaj moneroj nia svisa samideano konstruis la sekvantan valoran tabelon de la diversaj naciaj monunuoj rilate kun la internacia.

## TABELO DE NACIAJ MONUNUOJ (korektita)

kune kun ilia internacia valoro je «spesoj».

(ora fundamento).

1  $\mathfrak{S}$  (spesmilo) = 100 sd. (spesdekoj) = 1000 s. (spesoj)

10  $\mathfrak{S}$  egalvaloras ormoneron da 8 gramoj, laŭ orproporcio  $11/12$ .

Franc. } Belg. } Svis. }	1 franko (= 100 centim.)	= 396 Spesoj	1 Spesmilo = 2,5259	frank.
Ital.	1 liro (= 100 centesim.)	= 396 "	"	= 2,5259 lir.
Hispan.	1 peseto (= 100 centim.)	= 396 "	"	= 2,5259 peset.
Gr. Brit.	1 pundo sterl. (= 20 ŝiling.)	= 9985 "	"	= 0,1001503 pundo st.
"	1 ŝilingo (= 12 penc.)	= 499 "	"	= 2,0030 ŝiling
"	1 penco	= 41,60 "	"	= 24,036 penc.
U. Ŝ. A.	1 dolaro (= 100 cend.)	= 2052 "	"	= 0,4874 dolar.
German.	1 marko (= 100 pfenig.)	= 489 "	"	= 2,0460 mark.
Aŭstr. } Hungar. }	1 krono (= 100 heler.)	= 416 "	"	= 2,40 kron.
Rus.	1 rublo (= 100 kopek.)	= 1056 "	"	= 0,947 rubl.
Skand.	1 krono (= 100 oer.)	= 550 "	"	= 1,82 kron.
Holand.	1 floreno (= 100 cens.)	= 825 "	"	= 1,21 floren.
Portugal.	1 milrejsa (= 1000 rejs.)	= 2217 "	"	= 0,451 milrejs.
Grek.	1 drakmo (= 100 lept.)	= 396 "	"	= 2,5260 drakm.
Ruman.	1 leo (= 100 ban.)	= 396 "	"	= 2,5260 leoj.
Serb.	1 dinaro (= 100 paral.)	= 396 "	"	= 2,5260 dinar.
Bulgar.	1 levo (= 100 stotink.)	= 396 "	"	= 2,5260 lev.
Arg. Resp. } Kolumbio } Uruguajo }	1 peso (= 100 centav.)	= 1980 "	"	= 0,5052 pes.
Brazil.	1 milrejsa (= 1000 rejs.)	= 1121 "	"	= 0,892 milrejs.
Ĉil.	1 peso (= 100 centav.)	= 1472(?) "	"	= 0,679(?) pes.
Hin.	1 taelo (arg.) (= 1000 kaŝ.)	= 3246(?) "	"	= 0,308(?) tael.
Egipt.	1 Egipta liv. (= 100 piastr.)	= 10300(?) "	"	= 0,09715(?) Eg. liv.
"	1 piastro (= 40 paral.)	= 103(?) "	"	= 9,715(?) piast.
Hind.	1 rupio (= 16 ana.)	= 970(?) "	"	= 1,031(?) rupi.
Japan.	1 yeno (1897) (= 100 sen.)	= 1023 "	"	= 0,978 yen (1897).
"	1 " (1871) (= 100 " )	= 2045 "	"	= 0,489 " (1871).
Filip. Ins.	1 peso (= 100 centav.)	= 1026 "	"	"
Meksik.	1 peso (= 100 centav.)	= 1010 "	"	= 0,99 pes.
Pers.	1 tomano (= 10 kran.)	= 3530(?) "	"	= 0,2832(?) toman.
Peruo.	1 solo (= 10 diner.)	= 999 "	"	= 1,0015 sol.
Turk.	1 Turka liv. (= 100 piastr.)	= 9103(?) "	"	= 0,10983(?) Turk.liv.
"	1 piastro (= 40 paral.)	= 91(?) "	"	= 10,983(?) piast.
Venez.	1 bolivaro (= 100 centav.)	= 396 "	"	= 2,52,59 bolivar.

Laŭ tiu ĉi tabelo oni povas tre facile internaciigi iun ajn nacian monon (flanko maldekstra) kaj renverse transigi internacian monon en monon nacian. Ekzemple: 100 rubloj = 105600 spesojn = 105,6  $\mathfrak{S}$ . 100  $\mathfrak{S}$  = 94,7 rublojn.

Jen estas la nuda skeleto de Internacia monsystemo enkondukata nun de esperantistoj. Kiel ni jam rimarkis supre, tiu ĉi systemo estas pure teoria, sed multe utilas en la pli aŭ malpli preciza taksado de fremdnaciaj monoj. Kiam ni deziras

havi kursan valoron de monsumoj, ni devas ĉiam alĝustigi la tabelon al la ekzistanta kurso, kiun kompreneble neniu tabelo povas antaŭvidi.

En la fino de tiu ĉi artikoleto ni deziras fari unu praktikan rimarkon. Multaj niaj ĵurnaloj, enkondukintaj jam tiun ĉi monsystemon de S-ro R. de Saussure, ofte malatentas la tabelon kaj ne tute

precize valorigas la monon laŭ la preparol-ata sistemo — tio naskas konfuzon kaj ne pravajn atakojn kontraŭ la sistemo mem.

Kompreneble internacia monsystemo bezonas ankoraŭ pridiskutadon kaj tiel ni volonte malfermos niajn paĝojn por kompetentuloj, kiuj dezirus esprimi siajn opiniojn.



## Ekspozicio kaj pola kongreso esperantista

en Częstochowa (1909).



Jak wspominaliśmy już w poprzednim numerze naszego pisma, Zarząd wystawy przemysłowo-rolniczej, która ma się odbyć latem przyszłego roku w Częstochowie, zwrócił się do komitetu „Polskiego Towarzystwa Esperantystów“ w Warszawie z propozycją urządzenia działu esperanckiego oraz zwołania do tego miasta zjazdu polskich esperantystów. Warszawskie Towarzystwo Esperantystów chętnie przyjęło tę propozycję i przyrzekło swoją pomoc.

Wobec tego, że będzie to pierwsza poważniejsza wystawa esperancka w kraju\*), mamy nadzieję, że polscy esperantysty, a w pierwszym rzędzie komitet Warszawskiego Towarzystwa dołożą wszelkich starań, aby wypadła ona jak najlepiej.

Wystawa ta dla nas będzie miała podwójne znaczenie. Popierwsze da ona nam możliwość zaznajomić polskie społeczeństwo z olbrzymim już dziś ruchem

Kiel ni jam notis en la antaŭa numero de nia organo, la komitato de la ekspozicio industria-agrikultura, kiu devas okazi en la somero de la sekvanta jaro en Częstochowa (Ĉenstoĥova), turnis sin al la „Pola Esperant. Societo“ en Varsovio kun propono aranĝi fakon esperantan kaj organizi en tiu ĉi urbo kongreseton de polaj esperantistoj. La Varsovia societo de esperantistoj akceptis la proponon kaj promesis sian helpon.

Ĉar ĝi estos la unua pli serioza esperanta ekspozicio en nia lando\*), ni esperas, ke polaj esperantistoj kaj en la unua vico la komitato de l' Varsovia societo, faros ĉiujn penojn, por ke ĝi sukcesu kiel eble plej bone.

Tiu ĉi ekspozicio havas por ni duoblan signifon. Unue ĝi donos al ni eblon konatigi la polan societeton kun la grandega

\*) Niedawno odbyła się wystawa w Łukowie.

\*) Antaŭ nelonge okazis esperanta ekspozicio en Łuków.

esperanckim w całym świecie, podrugie przyczyni się w znacznym stopniu do zśrodkowania ruchu esperanckiego i do bliższego zespolenia zwolenników tej idei w Polsce.

Zdaniem naszym, należałoby dziś już podzielić czynności przygotowawcze, powierzwszy je specjalnie zwołanej w tym celu komisji pod kierunkiem zarządu Warsz. Tow. Komisja ta winna natychmiast przystąpić do zbierania jak największej ilości materiału wystawowego, który należy później stale przechowywać przy warszawskim towarzystwie, aby z niego można było korzystać do wszystkich innych przyszłych wystaw w kraju. Materiału tego nam nie zbraknie: posiada jego dosyć Warszawa, a wszystkie firmy esperanckie chętnie nadeszłą różne artykuły wystawowe. *W tym celu zwracamy się do wszystkich esperantystów całego świata, aby rozpoczęli już dziś przysyłać pod adresem Warsz. Tow. (Zgoda 4) wszystko, co mogłoby nadawać się do wystawy.*

Nie wymieniamy artykułów, gdyż im więcej ich będzie i im rozmaitsze będą one, tym bogatszy będzie materiał wystawowy.

Co zaś dotyczy zjazdu, zanim będzie ułożony jego program i wyznaczony jego ostateczny termin, pragnęlibyśmy zwrócić uwagę tych osób, które się tą sprawą zajmą, że my, polscy esperantyści, nadajemy mu bardzo duże znaczenie dla rozwoju naszej idei u nas. Zastąpi on do pewnego stopnia zjazd międzynarodowy dla tych, którym różne okoliczności utrudniają wyjazd za granicę. Zjazdy lokalne przyczyniają się zawsze do spotęgowania ruchu miejscowego. Im też w głównej mierze zawdzięcza swój szybki rozwój Esperanto na całej kuli ziemskiej.

jam hodiaŭa movado esperanta en la tuta mondo, due, ĝi helpas en granda grado koncentri nian esperantistan movadon kaj interproksimigi la adeptojn de tiu ĉi ideo en Polujo. Por tiu ĉi celo ni devas uzi ĉiujn fortojn, por ke la ekspozicio kaj eventuale la kongreseto havu kiel eble plej grandan sukceson.

Laŭ nia opinio oni devus jam hodiaŭ dividi la preparan agadon, konfidinte ĝin al speciala komisio sub la direkto de la komitato de l' Vars. societo; tiu ĉi komisio devas tuj komenci la kolektadon de kiel eble plej granda materialo ekspozicia, kiu poste devas esti konservata ĉe la Varsovia societo, por ke oni povu ĝin uzi por ĉiuj aliaj estontaj ekspozicioj en nia lando. La materialo ne mankos al ni: ĝin posedas sufiĉe Varsovio kaj ĉiuj firmoj esperantaj volonte alsendos al ni diversajn ekspoziciajn objektojn. *Pro tiu ĉi celo ni turnas nin al la esperantistoj de la tuta mondo kun peto, ke ili komencu jam hodiaŭ alsendadi sub la adreso de l' Vars. Societo (Zgoda 4) ĉion, kio povas utili al la ekspozicio.*

Ni ne nomas objektojn, ĉar ju pli nombraj kaj ju pli diversaj ili estos, des pli riĉa estos la ekspozicia materialo.

